**N I A   V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JUNIO 2006**

Oni povas vidi "Nia Voĉo"-n en la Gazetoteko Lanti. http://www.gazetotekolanti.com/nv

**65 A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO**

El Puig (10 km de Valencio). 21a - 25a de julio 2006. Pli da informoj http://www.esperanto-es.net/congreso 2006 kie vi trovos informojn pri kotizoj kaj aliĝilon. Jen la aliĝ-prezoj en eŭroj (ĝis 7a Junio validas la antaŭaj: profitu!)

| Kategorio | Ekde la 8 a de junio |
|---|---|
| HEF-ano | 33 |
| Ne HEF-ano | 38 |
| Juna HEF-ano | 24 |
| Juna ne HEF-ano | 28 |

Pagmaniero / forma de pago:
Bancaja. C/ Málaga 37 · 46009 Valencia. C/C 2077-0069-24-3100702329

Kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la adreso: Augusto Casquero de la Cruz. Avenida Burjasot 29, A-31. 46009 Valencia. (augusto2931@hotmail.com)

## "El hombre que desafió a Babel"

La revuo de la sindikato CNT recenzis la libron en sia numero de majo kaj Alejandro Pareja prezentis ĝin la 10 an de majo, en Librería Muga de Madrido.

Hispana versio de la biografio de Zamenhof verkita de Masson/Centassi, tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. PVP 20 eŭroj.

Ĝis la Hispana Kongreso, fine de julio 2006: po 23 eŭroj vi ricevos **"El hombre que desafió a Babel"** kaj **"Nuevo Método de Esperanto"**de Fernando de Diego; la prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe
Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

**INTERNACIE**

**Benedikto XVI** unuafoje bondeziris en esperanto, laŭ la Paska formulo iniciata de sia antaŭulo, "Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta". Li benis en sesdek lingvoj, la lasta la latina kaj esperanto la antaŭlasta.

La hejmpaĝaro de **Montpellier**, granda urbo de Sud-Francio, estas tradukita esperanten: http://eo.montpellier.fr/18-accueil.htm

Montpeliero estas aparte konata en Esperantujo depost la jaro 1998, kiam ĝi akceptis la 83an Universalan Kongreson de Esperanto.

La membraro de **UEA** por la tria jaro kreskis en 2005 ĝis 18.360 de 113 landoj: individuaj membroj 6.107, 10.179 aligitaj membroj kaj 2.074 junaj aligitaj membroj.

**EN HISPANIO**

Okaze de la inaŭguro de la e-kurso en la Universitato de Oviedo, Astura Esperanto-Asocio transdonis ekzempleron de Don Kiĥoto en esperanto. http://uica.info:9673/esperanto

La 20 an de majo Félix Lobo organizis promeneton de pli ol du horoj por rigardi kaj aŭskulti birdojn en la Casa de Campo, la plej granda parko de Madrido.

Alejandro Pareja, kiel profesia tradukisto, tradukis dokumenton en esperanto de la Fondaĵo "Antoni Grabowski" laŭ peto al HEF de advokata oficejo.

**EKSTERORDINARA KUNVENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

Dum la eksterordinara kunveno de HEF en la sidejo de la Esperanto-Grupo de Valencio oni aprobis la kontojn kaj kas-staton de 2005.

La estrar-kunveno de HEF okazinta en majo aprobis aĉeti skanilon por kompletigi la informatikan kolekton de "Boletín": Pedro Garrote faros la skanadon. En la sama kunveno Manolo Parra akceptis helpi al la redaktoro de Boletín en ĝia maketado.

**HISTORIO DE ESPERANTO** (Toño del Barrio)

Jam de antaŭ iom da tempo mi cerbumas pri projekto por organizi pli sisteman studon de la historio de nia movado en Hispanio. Kiel vi vidas, oni ofte demandas nin pri praŭloj kiuj scipovis la lingvon, kaj tio ĝenerale vekas tre grandan intereson en eksteruloj. Aliflanke tio havas la riskon ke oni tro rilatigu nin al la pasinteco, sed mi pensas ke ni povas organizi tion bone por minimumigi tiun riskon. Ni perdis la memoron pri multaj valoraj homoj, kaj ankaŭ rompiĝis la tradicio de multaj grupoj, kaj ni havas bonan ŝancon remalkovri ilin. Kiel vi scias, oni nun aprobis ke tiu ĉi jaro estu la "Jaro de la historia memoro", kaj ni povus profiti parton de la penoj farotaj oficiale por niaj celoj. Mi eĉ pensis aliĝi al la peto de subvencioj por tio, sed mi ne scias ĉu mi trovus sufiĉan apogon por la administraj demarŝoj. Nur por diri du ekzemplojn pri la ekstera intereso pri nia historio, aparte de la petoj ĉiusemajne ricevataj en HEF kaj en aliaj instancoj:

- Mi nun verkas artikolon pri homo pri kiu mi jam parolis en alia okazo, la pedagogo Sidonio Pintado, kiu estis prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio, kaj estis mortpafita post la milito. Tio havis sian originon en kontakto de unu lia nepino, kiu havas materialon pri lia esperantisteco.

- Mi petis informojn pri konsilisto de la unua vaska registaro, Santiago Aznar. Mi menciis lin en mia prelego en Bilbao pri alia konsilisto, Juan Gracia: http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/gracia.htm, sed ne havis multajn informojn aparte pri li. Mi demandis pri li al lia bonepo, kaj tiu ĉi respondis al li konfirmante ke li estis esperantisto, kaj ke li rakontis al li pri Esperanto dum sia ekzilo en Karakaso. Ah, mi forgesis diri ke lia bonepo estis... Iñaki Anasagasti (jes, la politikisto), kaj ke li promesis informi nin plu pri tio.

Nun estas la ĝusta momento. Mi pensas ke nun, antaŭ ol estos tro malfrue, ni devas kolekti informojn de niaj veteranoj. Ni devas kontakti familianojn. Ni devas restudi malnovajn librojn, kolekti adresarojn, traserĉi bibliotekojn. Ni devas koni la aktivadon ne nur de la gravuloj en la movado, sed de la ĝeneralaj esperantistoj. Kial ili lernis Esperanto, kion ili faris per ĝi.

Kaj post tio informi la esperantistaron ke Esperanton ne lernas kvar frenezuloj, sed homoj tre valoraj, kiuj defendis idealon (eĉ se ne ĉiam la saman), pri kiuj ni povas fieri. Kaj ankoraŭ poste informi la publikon ke Esperanto plu vivas kaj ke ni reprenis ilian torĉon.

Kion vi opinias? Ĉu meritas la penon? Ĉu vi pretus partopreni? Amike, Toño del Barrio
http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/es.htm

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere (17,30-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7. Tel. 91 446 80 79

19 de junio je la 19,00: komentitaj lumbildoj pri “Hispanaj printempaj popolaj festoj”

La membroj kiuj ankoraŭ ne abonis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid,

Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid

Oferta hasta finales de julio: "El hombre que desafió a Babel" y "Nuevo método de esperanto" por 20 euros (incluye envío a España)
Imprescindible pago previo a la cuenta de Esperanto Liceo de Madrid
Banco Sabadell/Atlántico 0081 7110 98 0001266730


**cnt** 323

**Mayo 2006**
VI época - Madrid

www.periodicocnt.org

**Edita:** Confederación Nacional del Trabajo
**Director:** M. A. Fernández
**Administración:** R. Alcalde, J. Reyero
**Redacción:** J. Blasco, M.G. Blázquez, M. Cobo, L. Gómez, H. González, R. Iglesias, A. López, E.R. Rosell
**Confección gráfica:** J. Cortés, Mutis, F. Pisaca, S. Valgañón
**Logística:** F.L. de Madrid
**Redacción y Administración:** Pza. Tirso de Molina 5 -6°. 28012 Madrid. Tel. 913 690 838 / 913 690 972. Fax 914 200 856
**Correo electrónico:** redaccion@periodicocnt.org
**Distribución:** F.L. de Madrid
**ISSN.** 1135-173X **D.L.:** M-36436-79




# El hombre que desafió a babel

**Esperanto Liceo**

Esta biografía descubre al gran público la vida apasionada del padre del idioma esperanto al que Umberto Eco ha rendido homenaje en *La búsqueda de la lengua perfecta*. Es el retrato de un humanista, médico, idealista, visionario, de un hombre que desafió a Babel en la Varsovia ocupada por los alemanes y que vivió en su propia carne el problema de la comunicación entre los pueblos. La obra aclara aspectos desconocidos de la historia, de la ideología y de la estructura del esperanto.

La lengua internacional nació del sueño juvenil de Luis Lázaro Zamenhof de dar a todos los pueblos de la tierra un medio de comunicación.

Luis se sometió primero a la voluntad de su padre y se hizo médico, dejando sus primeros trabajos sobre lenguas planificadas para continuar sus estudios. Pero, más tarde, afrontando al mismo tiempo su trabajo como oftalmólogo, lucha contra la pobreza y la indiferencia, resistiéndose al escepticismo que se opone a todo invento humano.

Desde hace más de un siglo, innumerables esperantistas continúan la obra de Zamenhof en todos los continentes. Su trabajo, avalado por una cultura de esperanto amplia y plural, es suficiente para afirmar que Babel se puede derrumbar.

"La historia y la ideología del esperanto me parecen fenómenos interesantes: son su lado desconocido. Las personas perciben el esperanto como la propuesta de un instrumento. No saben de la idea que lo mueve. Sería necesario dar a conocer más este aspecto (...) La mejor biografía de Zamenhof... Se la recomiendo a mis alumnos... Espero que este libro tenga la difusión que se merece." (Umberto Eco).

René Centassi (1922-1998), ex-redactor jefe de la agencia France Presse es autor, con el periodista Gilbert Grellet, de la biografía de Emile Coué.

Henri Masson es secretario general de SAT-Amikaro (asociación para la difusión del esperanto en países de habla francesa) y consejero general de SAT (Asociación Mundial Anacional).

***El hombre que desafió a babel***
*René Centassi y Henri Masson*
*GRAM Ediciones*
*Madrid, 2005*
*334 págs. 20 €*
*ISBN: 84-88519-15-X*



## Comunícate en esperanto



- Servicios de correspondencia, por correo o por Internet
http://purl.org/net/kosomo
http://purl.org/net/korespondo

- Listas internacionales, nacionales y los más diversos temas y especialidades
http://purl.org/net/dissendo

- Grupos de noticias
news:soc.culture.esperanto

## Charla directamente

Mediante ICQ, con esperanto-hablantes de más de 50 países.
http://purl.org/net/icqlisto

- Con IRC en los canales #esperanto de diversas redes : Dalnet, Undernet, Effnet, etc.

- En el sitio *web* ruso *Karelia Babilejo*
http://purl.org/net/babilejo

## Viaja por medio del esperanto

- Con *Pasporta Servo* y *Amikeca Reto*
Más de 1000 direcciones de todo el mundo, donde alojarte gratis en tus viajes por medio del esperanto.
http://esperanto.net/ps
http://creaweb.fr/a.reto

- En bicicleta con *BEMI*
Movimiento internacional de ciclistas hablantes de esperanto
http://bemi.free.fr

## Música en esperanto

- ***Muziko-Panorama***
Descubre horas de música en esperanto, de diversos estilos y países, en *mp3* y *Real Audio*.

http://purl.org/net/muziko

- ***Vinilkosmo***
Escucha por la red y compra de discos

www.vinilkosmo.com
Vinilkosmo@Esperanto.org

## Lectura en esperanto

- Revista Internacional *Monato*

www.esperanto.be/monato

- Biblioteca Electrónica *eLibrejo*
Libros en formato PDF.

www.esperanto.nu/eLibrejo

## Radio en esperanto

Visita el sitio web de *AERA*, Amigos del Esperanto en la Radio, para encontrar horarios, frecuencias, y para escuchar en directo algunos programas mediante *Real Audio*.

http://osiek.org/aera
En Radio Klara 104.4 los viernes de 20.30 a 21.30

## Actividades en esperanto

A lo largo del año tienen lugar por todo mundo todo tipo de actividades en esperanto: festivales, cursos, viajes, encuentros, congresos, organizados por asociaciones locales, nacionales o internacionales.

- Calendario completo de actividades
http://www.eventoj.hu/kalendar.htm

## Índices de recursos en Internet



- *Open Directory Project*
Más de 2000 sitios *web* en esperanto, explorables por categorías o palabras clave

http://dmoz.org/World/Esperanto

- *Virtuala Esperanto-Biblioteko*

Índice de recursos en esperanto, por categorías.

www.esperanto.net/veb